

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond, prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando, kiu respondas al mesaĝoj de kelkaj geaŭdantoj kaj rakontas pri heroismo nekonata.

Kun plezuro mi respondas per tiu elsendo al la afablaj salutoj de kvar geaŭdantoj, kiuj skribe diris sian interesiĝon al niaj prelegtemoj. El Lyss (Svislando) s-ro Edwin Thomas diras, ke li regule aŭskultas niajn paroladojn. El Hexham (Britio) gesinjoroj Brownlee diras sian ĉagrenon pro la forpaso de profesoro Charles Ecabert, kiu sekvis al d-ro Edmond Privat por tiuj elsendoj. Mi sciigas ankoraŭfoje niajn geaŭdantojn, ke tre bedaŭrinde s-ro Ecabert mortis la 15-an de decembro post kelkaj semajnoj de terura virusa malsano. Li estis nur 46-jara. El Bolzano (Italio) alvenis tre interesa mesaĝo de s-ro Giovanni Pissaloli (eble mi eraras pri la familia nomo, kiun mi malfacile povas legi). Mi legas al vi kelkajn liniojn de la letero de nia itala samideano :

« Kun granda intereso mi aŭskultis la radio-paroladon pri la agoj de la mafia-movado en Sicilio rilate al la konstruo de baraĝo apud Palermo, kaj pri la konduto de s-ro Dolĉi kaj de la registaro. [...] Ĉi tiu detala informo estis por mi novaĵo. [...] Mi havis ĝojan senton aŭdinte, ke inter tiom da egoismoj, memamo, krueleco kaj sinvendado ekzistas homoj (ege malmultegaj), kiuj pretas forriski sian vivon por la bono de la aliaj. Do koran dankon pro la elektita temo. » (Fino de la citaĵo).

Al nia samideano mi diros, ke laboras sur nia tero multe pli da sindonemaj kuraĝuloj, ol oni kutime pensas. Mi estas kontenta, se mi povis turni viajn okulojn al la laboro de Danilo Dolĉi, kiu estras neperfortan revolucion en Sicilio. Hodiaŭ mi volas atentigi vin pri la agado de multnombraj volontuloj, kiuj donas kelkajn monatojn aŭ eĉ kelkajn jarojn de sia vivo por alporti helpon al malprivilegiitoj. Tiuj volontuloj ofertas senpage sian servon al la movado nomata Internacia Civila Helpservo, kiun fondis la svisa inĝeniero Pierre Ceresole, tio en la jaro 1919, do tuj post la unua mondmilito.

Dum la monato oktobro de la lasta jaro mi estris en Münchenbuchsee (urbeto, kiu situas en Svislando apud la ĉefurbo Berno) laborrestadon de tiu Internacia Civila Helpservo. Ni konstruis por infanhejmo flankdomon kaj instalas centralan hejtadon. Per nia senpaga laboro tiu hejmo povas modernigi sen danĝero por siaj financoj. Dum tiu restado laboris interalie du svisaj gejunuloj, kiuj sin proponis al Internacia Civila Helpservo por labori dum longa periodo en Alĝerio. Mi devis kontroli iliajn kapablojn por la domkonstruado, ĉar en Alĝerio la civilistoj konstruas domojn. La junulo, kiu estis kampar-devena studento, estis tre lerta masonisto, la junulino, kiu estis kuracist-helpantino ankaŭ kun kuraĝo kapablis konstrui murojn. Kaj nun, tiuj ambaŭ gejunuloj veturis ĝis ruinigita vilaĝeto en Alĝerio, kie ilia tasko estas konstrui centkvindek domojn. La laboro ne estas facila, nek la vivkondiĉoj. Necesas trovi akvon, fari mem la cementon pere de kalŝtonoj, serĉi sufiĉe malproksime la necesan sablon kaj gruzon por la betono. Sed ili havas kuraĝon. Kun sia grupo ili ne nur okupiĝas pri la konstruado de tiuj domoj, sed ili ricevas vestaĵojn kaj kovrilojn rikoltitajn en Eŭropo far Ligo de la Societoj de la Ruĝa Kruco, por ilin disdoni al la vilaĝanoj. Ili ĉiutage ricevas lakton de la alta komisarejo de Unuiĝintaj Nacioj por la rifuĝintoj, kiun ili disdonas al la infanoj. Ili malfermis lernejon, kie ili instruas ne nur la legadon, sed plej diversajn manlaborojn. Tiel la vilaĝanoj rekuraĝiĝas, kaj ili ankaŭ sin metas al la laboro. La civilistoj vizitas la tutan regionon, kaj helpas kuraciston kaj flegistinojn, kiuj ankaŭ laboras senpage. Hodiaŭ jam kelkaj naŭ domoj estas pretaj, domoj enhavantaj du ĉambrojn, kuirejon, internan korton kun necesejoj. Tio okazas en la vilaĝeto El Khemis en la regiono Tlemcen, loko sufiĉe proksima de la maroka limo. En aliaj vilaĝoj aliaj domoj tiel ankaŭ ekkreskas. Estas ja malmulte, sed tamen promeso por la estonto de vilaĝanoj, kaj ĉefe de iliaj infanoj.

Pri tiu laboro de centoj da civilistoj oni ne parolas, ĉar ili agadas senbrue. Kelkaj estas eĉ veraj herooj. Mi citu la ekzempon de du svisaj civilistoj, kiuj dum la alĝeria milito estis senditaj por konstrui lernejon en araba urbaĉo. Kiam la aliaj civilistoj reveturis Eŭropon, tiuj du gevolontuloj restis ĉe siaj muzulmanaj amikoj por instrui iliajn infanojn. Ili aĉetis per siaj propraj ŝpar-ekonomioj, kiujn ili venigis el Svislando, malnovan domon, kiun ili mem riparigis, kaj en ĝi ili instruis metiojn al gejunuloj. Ili ne volis aŭskulti la konsilon de diversaj svisaj geamikoj. Ili geedziĝis kaj tie laboris ĝis kiam OAS-anoj ilin kaptis kaj mortigis kaj bruligis la domon. La vivo de tiuj Simone kaj Emile Tanner estas ekzemplo de nekonata heroismo, kaj estas miloj da aliaj Simone kaj Emile Tanner, kiuj havis la saman kuraĝan sintenadon.

Vi aŭdis prelegon en esperanto el Svislando. Parolis Claude Gacond pri heroismo nekonata.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-